# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 3/1995 MAJO–JUNIO


kooperativo de literatura foiro

La Kongresfako de Kooperativo Literatura Foiro afable petas vin informi viajn legantojn pri la sekva aranĝo:

*14a Internacia Literatura Forumo*

pri

## *AMO EN POEZIO KAJ EN PROZO*

okazos en
Gdansko/Pollando
inter la 15 - 19 julio 1995

kun interesaj prelegoj, riĉa kultura kaj distra programo, unutaga ekskurso

organizantoj:
LF-koop kaj
Junulara Kreema Klubo PLAMA

PS: Rigardu ankaŭ en SES INFORMAS 2/95 p.8.

Kompleta programo kaj aliĝilo estas ricevéblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Bv aldoni (al vi) adresitan kaj afrankitan koverton. Dankon. -FL-

## G R U P A J   I N F O R M O J

**ESPERANTO-SOCIETO BASEL:**
En la maljunulejo NEUBAD, Holeestr.219, (Tramo 8 ĝis haltejo Neubad, aŭ buso 36 ĝis haltejo "Holee".
18.5.20.00h S-ro Hans-Peter Senn daŭrigos la prelegon pri Egiptio, kun lumbildoj.

22.6.20.00h Monata Kunveno ĉe Patrik Renĉ, Bachmattenstrasse 27.
Ni kune trarigardos la libro-skatolojn donacitajn siatempe de s-ro H. Schmutz. Ni skribos liston, por ke oni povu pruntepreni la librojn.

**BELLINZONA:**
Ni kunvenas ĉiam sabate en Viale Motta 32:
13.5.17.00h kaj 10.6.17.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
2.5.19.30 kaj 6.6.19.30h

**ESPERANTORONDO BIEL:**
En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
ĉiun vendredon 18.00-19.00h.

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**
En Institut National Genevois.
12.5.19.15h Monata Kunveno.
9.6.19.15h Monata Kunveno.
11.6: Ni ekskursos kun Laŭzana Esperanto-Societo al la lago Chavonnes, proksime de Bretaye,en la Vaŭdaj alpoj. Detaloj aperos en la venonta Brasikfolio.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**
10.5.14.00-16.00h en Big Ben.Paroliga kun-
(Merkreso) veno. Gvidos Franz Brügger.
25.5.(ĉieliro) Per propraj aŭtoj ni vetueos al la parkejo "Gantersei) en Eigental. Tie je la 10.30

Ni ekpromenos al "Unterlauelen" (ĉ.30 Min.) por tagmanĝi kaj babiladi.

14.6.14.00-16.00h en Big Ben. Paroliga kunveno. Gvidos Franz Brügger.
22.6.20.00h en restoracio Simplon. Parolos Ernst Glättli pri:"La konstruado kaj funkciigo de la Jungfrau-fervojo".(Kun lumbildoj).

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstr. 18.
10.5.20.00h Monata Kunveno: Provleciono por interesitaj ne-esperantistoj. Gvidos Verena Chaves-Walder.
14.6.20.00h Monata Kunveno:IFEF-Kongreso en PECS. Raporto kaj impresoj,kun lumbildoj.Parolos Gertr.Eggenberger kaj B+S Pochanke.

**ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:**
8.5.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. "Kultura vespero".
29.5.19.00h Libera kunveno ĉe fam. Weidmann Eisengasse 22.

**E Ĥ O J EL Ĝ E N E V O:**

La 10-an de marto, la jarkunveno de la esperantogrupo "La Stelo" Genève estis okazo rerigardi la agadon pasintan kaj antaŭvidi la venontan. Dum la jaro 1994 la grupo okazigis dek kunvenojn kaj aperigis dek numerojn de sia informilo Brasikfolio. Samjare enkasiĝis ĉirkaŭ 1400.- da kotizoj kaj 300.- da donacoj, dum la kapitalo valoras 4600.- fr. La jarkunveno akceptis por la venonta jaro agad-programon, kiu ampleksas ĉiujn labo-

rojn de la komitato kaj la ceteraj kunlaborantoj: decidado (komitatkunvenoj, protokoloj), administrado (korespondaĵoj, kaso, adresaro, ejoj), kunvenoj,biblioteko, informiloj (Brasikfolio, informa materialo) kaj informado (kursoj, prelegoj). Reelektiĝis sep-membra komitato, kiu poste mem dispartigis la funkciojn: Andres Bickel - Prezidanto, Camille Bickel - bibliotekisto, Jean Rawiler, Christiane Sixtus Pot - presiganto, Betty Viret - kasisto, Eva Vischer kaj Gisèle Weill.
La venontaj monataj kunvenoj de la "Stelo" okazos la 12-an de majo, 9-an de junio, 8an de septembro, 13-an de oktobro kaj 10-an de novembro en la bela kunvenejo Institut National Genevois, Promenade du Pin 1, subteretaĝe. Ekde la horo 18.45 funkcias la grupa biblioteko kaj je la 19.15 komenciĝas la prelego. Pliajn informojn vi petu ĉe Esperanto-INFOS: tel. 022/740 04 45.

Andres Bickel

oo0oo

**IFEF-KONGRESO 1995:**

La 47-a Kongreso de la INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO (IFEF) okazos en PÉCS/ Hungario,de la 20-a ĝis la 26-a de majo 1995.
Adreso: Kongreso de IFEF, PF 7,
H-1378 Budapest.

oo0oo

**KORESPOND-PETO** de juna rusa lerneja grupo:

Ni ege ĝojus trovi gekorespondantojn en Svislando. Niaj grupanoj interesiĝas pri muziko, sporto kaj turismo. Koran dankon antaŭe, Maria, Oksana,Julia, Olga ktp. Ni revas pri leteroj el via lando.Adreso: 626440 Rusio-Poccia, Nijnevartovsk 6, Interklubo-Esperanto.

oo0oo

**REVIZORA RAPORTO DE LA SES-KASO 1994**

La subskribintoj,

Margrit Guldin, Murtenstrasse 1, 3008 Bern
kaj Ernst Glättli, Laurstrasse 17, 5200 Brugg

kunsidis la 3-an de februaro 1995 en la domicilo de la SES-kasisto, sinjoro Ernst von May en Oberuzwil, por revizii la librotenadon de Svisa Esperanto-Societo (SES).

Dum la revizio ni certigis nin pri:

- la ĝusta transskribo de la saldoj el la antaŭjaraj kontofolioj,
- laŭorda enskribo de la en- kaj elspezoj, surbaze de ekzistantaj pruviloj,
- la korekta transskribo de la konto-saldoj en la bilanco-kontojn,
- la efektiva ekzisto de la kapitaloj, listigitaj en la bilanco sub "Aktivoj", pruvita per konfirmoj de la koncernaj bankinstitutoj.

La jarkalkulo 1994 de SES aspektas multe pli bone ol antaŭvidis la budĝeto. Ĝi finiĝas per malgajno de Fr. 618.- dum la budĝeto prognozis perdon de Fr. 4750.- . Konsiderinde malpli da elspezoj sub "Informado/varbado" kondukis al tiu ĉi preskaŭ egaligita jarkalkulo.

La tuta havaĵo de SES (kapitalo kaj rezerva kapitalo) sumiĝis la 31-an de decembro 1994 je Fr.73'763.65. Tio signifas, ke la kapitalo malpliiĝis je Fr.226.70 kompare kun la antaŭjara posedaĵo.
La revizoroj povis konstati, ke la librotenado estis tre zorgeme farita kaj la konto/pruviloj bonege ordigitaj.
Surbaze de tiuj ĉi kontrolrezultoj ni proponas al la ĝenerala kunveno de SES aprobi la jarkalkulon 1994, malŝarĝi la CK kaj danki al nia fidela kasisto, pro la modele plenumita tasko dum la jaro 1994.

Bern kaj Brugg, la 4-an de februaro 1995.

La kaskontrolantoj:
Margrit Guldin + E. Glättli

## BALTAJ ESPERANTO-TAGOJ

La Litova Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la 31-unuajn tradiciajn, somerajn Esperanto-Tagojn (BET 31.)

Ili okazos de la 8-a ĝis la 16-a de julio 1995.

CELOJ kaj TASKOJ.
Studi problemojn de la Esperanto-Movado, starigi taskojn de Esperanto-Agado, interŝanĝi sperton pri esperantista agado, perfektiĝi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon.

LOKO:
BET 31 okazos en arbarista lernejo en GIRIONYS, 17 km oriente de Kaunas.

Detalaj informoj kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS.
Bonvolu aldoni (al vi) afrankitan koverton.
Dankon. -FL-

oo0oo

## M O R T A N O N C O

La 10-an de marto 1995 mortis,en la Kantona Hospitalo de Baden, nia amiko

**Paul Bächli**

en sia 94-a vivjaro. Li estis longjara membro de ESZ, SES kaj UEA. Kara Paul, vi restos ĉe ni en bona rememoro. (Nekrologo sekvos en estonta SES INFORMAS.)

Al la funebranta familio ni esprimas nian plej sinceran kondolencon.

Esperanto-Societo Zürich
Svisa Esperanto-Societo
kaj la red. SES INFORMAS

# HEROLDO DE ESPERANTO

Red. Ada Fighiera - Sikorska
Via N. Sandre, 15
I - 10078 Venaria R. (Torino), Italio
Fakso: (011) 2263078

HEROLDO DE ESPERANTO PETIS NIN PUBLIKIGI
la suban informon en SES INFORMAS:

SENPAGA EKZEMPLERO DE "HEROLDO"

## ELEKTO EL PLI OL 200 ESPERANTO-KUNVENOJ EN 1995

La printempa duobla numero di "Heroldo de Esperanto" enhavas detalan liston de ĉiuj plej gravaj feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto ĉie en la mondo.

La listo por 1995 detaligas datojn, adresojn kaj programojn kaj priskribas pli ol 200 aranĝojn.

Oni povas senpage ricevi la supre menciitan duoblan numeron, marpoŝte, mendante ĝin ĉe la redakcio (Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (Torino), Italio). Kiel konate, "Heroldo de Esperanto", fondita en 1920, estas la plej populara gazeto en la internacia lingvo kaj estas eldonata de laŭleĝe registrita kultura societo sen profita celo.

A. Fighiera-Sikorska,

redaktorino

NE KREDEBLE, SES VERE!

La nova prezidanto de la Gastejo Edmond Privat/GEP, s-ro Mario Bélisle, migradis piede 2100 kilometrojn de la Chaux-de-Fonds ĝis Santiago de Compostela, en nordokcidenta Hispanio. Gratulon Mario, pro tia rimarkinda sukceso.
(Legita en Brasikfolio) -FL-

ooOoo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

---

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

---

**NI KOLEKTAS KOMIKSOJN, KARIKATUROJN ktp:**

Nia Esperanto-Klubo en la supera mezlernejo Sumiyosi Kôkô planas okazigi"ekspozicion de komiksoj ęl la mondo",okaze de la lerneja festivalo en septembro 1995. Bonvolu sendi al ni komiksojn, karikkaturojn, bildstriajn rakontojn kaj tiel plu en kia ajn formo (libroj, gazetoj aù eltondaĵoj). Ni rekompence sendos japanan komikson. La limdato estas la fino de junio 1995.
Ni lolektos ankaŭ uzitajn poŝtmarkojn de eksterlando. Ni vendos ilin kaj oferos la profiton al UEA-fondaĵo por la movado en Azio kaj Afriko. Nia Adreso:

Esperantoklubo de Sumiyosi Kôkô
1957-4 Kizuki-sumiyosi
Nakahara-ku, Kawasaki-si
211 Japanio

Antaŭdankon.
Kitagawa Ikuko
Instruistino

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 4/1995 estas la 7-a de junio 1995.**